

XVI BIBLIA SEMAJNO

“LA VOJIRADO DE JESUO AL JERUSALEMO” (Mk. 8-11)

Montefano - 3a-8a de aŭgusto 2009

Zorge de Maurizio Valleri

Alberto kaj Rikardo akompanis nin ĉijare en la legado de kelkaj evangelieroj el la Evangelio laŭ Sankta Marko; ĝi estas kroniko de la vojirado de Jesuo al Jerusalemo, sed ĝi estas ankaŭ simboliko pri la itinero al la morto kaŭzita de la kontraŭmeto al la povo, kaj al la ŝanĝo enkondukita en la rilaton inter la homo kaj lia Kreinto.

La agordo kun Dio ne dependas de la rilato kun la religia medio, nek de la disigo inter puraĵo kaj malpuraĵo enkondukita de la homoj, sed ĝi dependas de la amrilato kiun oni sukcesas starigi kun la aliuloj. Fakte, ne estas kio devenas de ekstere kiu povas malproksimigi la homon de Dio, sed prefere estas la inklinoj kaj la obsedantaj deziroj kiuj eliras el la koro de la homoj tiuj kiuj malhelpas vidi la vizaĝon de la aliuloj kaj do tiun de Dio. La religio konvinkis la homon kredi ke la amo al Dio, pere de la Leĝo, estas pli granda ol tiu kiun oni ŝuldas al aliulo; tiu ĉi amo ne povas esti transdonata de iu ajn leĝo, sed nur pere de agoj kiuj komunikas vivon.

En tiu ĉi itinero al ŝanĝo, la dekdu eĉ se ili estas fizike proksimaj al Jesuo, ili ofte estas malproksimaj de li (Mk. 8,1... “li alvokis al si siajn disĉiplojn...”) per ilia penso kaj spirito, malsame ol la popolo kiu malsatas pri la novaĵo alportita de la Filo de la Homo (Mk.8,2... “ili nenion havas manĝi”). La fastado estas esprimo je morto kaj pro tio ĝi malkongruas kun la pleno de vivo komunikita de la Kristo, kies amo neniu ekskludas, kiu ajn estu lia sinteno aŭ lia deveno (Mk. 8,3 “... kaj iuj el ili venis de malproksime”). En la Malnova Testamento estis la popolo kiu petegis al Dio la panon (El. 16,7), kun Jesuo Dio antaŭas la bezonojn de la homoj (Mk.8,2 “Mi kortuŝiĝas pro la homamaso...”) fariĝinte li mem pano pere de la Eŭkaristio (Mk. 8,6 “kaj li prenis la sep panojn, kaj doninte dankon, li dispecigis ilin...”). La disĉiploj ne estas la posedantoj de la “pano”, sed ili estas tiuj kiuj ĝin disdonas kaj ne estas ilia tasko decidi al kiu ĝin doni (Mk. 8,6... “kaj li donis ilin al la disĉiploj por disdoni”) ĉar estas la pano kiu purigas tiun kiu ĝin ricevas kaj ne la homo kiu devas sin purigi por ĝin ricevi.

Kiuj opinias sin pli proksimaj al Dio, tiuj estas la unuaj kiuj Lin ne komprenas (Mk. 8.11... “kaj ili komencis diskuti kun li, serĉante ĉe li signon el la ĉielo...”), ĉar ili ne komprenas la lingvaĵon de la amo sed nur tiu de la povo (Mk.8,11 “...serĉante ĉe li signon el la ĉielo”) kiu ne estas propraĵo de Jesuo (Mk. 8,14... “Nenia signo estos donita al ĉi tiu generacio”). Tro ligitaj al la tradicio, (Mk. 8,15... “gardu vin kontraŭ la fermentaĵo de la Fariseoj...”), eĉ ne la disĉiploj lin komprenas (Mk. 8,17... “ĉu vi ankoraŭ ne konscias nek komprenas?”). Menso ne malfermita al la novaĵo fariĝas limigo (Mk. 8,18 “Okulojn havante, ĉu vi ne vidas? kaj orelojn havante, ĉu vi ne aŭdas?”) kiu nur ekster la influo de la tradicio (Mk. 8.23... “li

elkondukis lin ekster la vilaĝon”) kaj pere de vola streĉo (Mk. 8,24... “levante la okulojn”) denove povas sin malfermi al la vero de la aferoj (Mk. 8. 25 “li resaniĝis, kaj vidis ĉion klare”).

La bildo de Jesuo (Mk. 8,27 “Kiu, diras la homoj, ke mi estas?”) proponita de la disĉiploj, spegulas tiun konatan pere de la tradicio (Mk. 8.28... “laŭ aliaj: Elija; kaj laŭ aliaj: Unu el la profetoj”) kaj eĉ kiam li estas rekonata por ili Li estas la Mesio de la tradicio (Mk. 8,29 “Vi estas la Kristo”), la liberiganto de Izraelo, kaj pro tio li estas persono netaŭga por esti prezentata al la komumumo (Mk. 8,30 “Kaj li admonis ilin, ke ili diru al neniuj pri li”). Disvastigi bildon kiel tiun komprenitan de Sankta Petro, tio signifus elvoki atendon pri povo kiu ne estus atribuebla al la mesaĝo de la Kristo; eble estas pro tio ke Jesuo anoncas la unuan fojon kia estos lia sorto (Mk.8,31 “la Filo de homo devis multe suferi...”) kaj potencie tiu de iliaj sekvantoj, pro la ne evitebla kolizio kun la fortaj povoj (Mk. 8.31... “kaj esti rifuzita de la pliaĝuloj kaj la ĉefpastroj kaj la skribistoj...”). Tiu ĉi anonco kaŭzas rifuzon (Mk. 8.32 “Kaj Petro prenis lin, kaj komencis admoni lin”) ĉar ĝi situigas ekster la atendo de la disĉiploj. Tamen Kristo ree proponas la inviton sekvi Lin (Mk. 8,34 “Se iu volas veni post mi...”), rompante kun la fideleco al tiuj valoroj kiaj la povo, la prestiĝo, kiujn oni konsideras kiel ĉefajn en la vivo (Mk. 8, 34... “li abnegaciu sin”), sed kiuj malebligas la kreskon de la homoj. Sekve, ne temas pri rezigno de la personeco mem, kiel ofte multaj homoj komprenas, sed pli ĝuste temas pri la uzado de tiuj ĉi ecoj por sin trudi al la aliuloj, eĉ se la ne adaptiĝo povos kaŭzi malfacilaĵojn kaj penojn (Mk. 8,34... “levu sian krucon...”). Do, kiu pripensas nur sin mem (Mk.8, 35... “kiu volos savi sian animon”) tiu perdos la okazon vivi la plenan pere de la donaco al la aliuloj; fakte propra animo estas la ununura riĉaĵo de la homo (Mk. 8,37 “Ĉar kion homo donu interŝanĝe por sia animo? “), nenio povas kontribui lin plivalorigi ol la amrilato al la aliuloj. Preferi la mez kvaliton anstataŭ la vero (Mk.8,38 “Kiu hontos pri mi kaj miaj paroloj”) malebligos al Dio ke Li rekonu onin kiel filon (Mk. 8,38... “pri tiu ankaŭ hontos la Filo de homo.”) kaj montru en li la gloron, kiu estas la frukto de la dia agado responde al la elekto sin doni al la homaro. La disĉiploj (Mk. 9,2 “Li prenis kun si Petron, Jakobon kaj Johanon”) estas ĉiam pli konvinkitaj ke ili sekvas la mesion de la tradicio (Mk. 9,5 “ni faru tri laŭbojn: unu por vi, kaj unu por Moseo, kaj unu por Elija”), sed Jesuo ilin kunportis kun si ĝuste por montri ke la dian kondiĉon oni ne akiras pere de la leĝo, sed pere de la donaco de si mem. La aliformiĝo farita de tiu sinteno (Mk. 9.3... “kaj liaj vestoj fariĝis brilantaj”) estas la videbla manifestiĝo de tiu amo.

Dum Moseo kaj Elija sin difinis servistoj de Dio, Jesuo estas la Filo de Dio veninta por proponi kaj ne por trudi novan interligon, ne plu inter servistoj kaj mastro, sed inter filoj kaj Patro. Ju pli kreskas la similo al Jesuo des pli la plano de Dio por la homaro efektiviĝas (Mk. 9, 7 “Ĉi tiu estas Mia Filo, la amata; aŭskultu lin!”) kaj la perado de la tradicio fariĝas senutila (Mk.9,8... “ĉirkaŭrigardinte, ili jam vidis neniun krom Jesuo sola”) kaj danĝera ĉar ĝi malebligas kompreni la novaĵon de Jesuo (Mk. 9.9... “li admonis ilin, ke al neniuj ili rakontu tion, kion ili vidis”). La premo fare de la povo sur la popolo estas gravega (Mk. 9,17... “kiu havas mutan spiriton”) kaj longdaŭra (Mk. 9,21 “... Kaj li diris: De infaneco”) kaj pro tio la helpopeto estas eĉ

pli drameca (Mk. 9,22 “... kompatu al ni kaj helpu nin”); la liberigo eblos nur se estos akcepto de la mesaĝo de Jesuo (Mk. 9, 23... “Ĉio estas ebla por kredanto”) atestante ĝin per kohereco (Mk. 9, 29 “Ĉi tiu speco neniel povas eliri, krom per preĝado”). Kiuj sin fermas al la instruado de la Kristo, tiuj sin fermas ankaŭ al amo kaj ili eĉ sukcesos ĝin kontraŭi (Mk. 9, 31 “La Filo de homo estas transdonita en la manojn de homoj, kaj ili mortigos lin) cetere sen sukcesi tion fari (Mk. 9.31... “li leviĝos post tri tagoj”). La konsekvencoj de tiuj ĉi instruoj tamen daŭre timigas (Mk.9.32... “kaj ili timis demandi lin”) kaj pro tio, kiel okaze de la unua anonco, Jesuo altiras ilian atenton (Mk. 9,35... “li alvokis la dek du, kaj diris al ili:...”) sur la sinteno kiun oni devas havi por atingi la plenen de vivo.

La rekompenco por onies ago baziĝas sur la servo (Mk. 9,35 “Se iu volas esti unua, li estos lasta el ĉiuj, kaj servanto de ĉiuj”) kaj sur la egaleco (Mk.9, 36... “kaj preninte infanon, li starigis ĝin meze de ili”) ĉar estas tiu la ununura maniero por sperti Dion (Mk. 9,37 “Kiu akceptos unu el tiaj infanoj en mia nomo... tiu akceptas ne min, sed Tiun, kiu sendis min”). Al tiu ĉi instruo la disĉiploj daŭre rezistas, ili pli interesiĝas meti sin kiel novajn perantojn inter la popolo kaj Jesuo (Mk. 9,38... “ni malpermesis lin, ĉar li ne sekvas nin”). Ĉiu ajn ago direktita al la bono de la homo (Mk. 9,41 “kiu donos al vi trinki tason da akvo...”) tiu devas esti konsiderata kiel kontribuado al vojiro ĝis la pleno de la vivo de la individuo (Mk. 9,41 “tiu neniel perdos sian rekompencan”), dum kiu malhelpas tiun ĉi procedon (Mk. 9,42 “Kaj kiu igos fali unu el ĉi tiuj malgranduloj...”) estas destinita malaperi por ĉiam (Mk.9,42... “ĵetita en la maron”). Kiam ni komprenas ke io ajn en nia vivo domaĝas la aliulojn, do estas bone ke ni ĝin forigu (Mk. 9, 43 “Se via mano faligas vin, detranĉu ĝin”) ĉar eĉ se tio povas aperi kiel limigo, ĝi, kontraŭe, estas bono por la starigo de la morala vivo (Mk. 9,43... “estas bone por vi eniri en vivon kripla”) anstataŭ al ĝia definitiva dissolviĝo (Mk. 9,48 “kie ilia vermo ne pereas kaj la fajro ne estingiĝas”). La admono de Jesuo sin turnas al la komunumo, pli ol al la pekuloj, por ke ĉiu sciu limigi la personan kontentigon (Mk. 9.50 “sed se la salo fariĝis nesala”) direktante sian energion mem al la bono de la aliulo (Mk. 9,50 “Havu salon en vi, kaj paciĝu unu kun alia”).

La atako al la konvinko ke la leĝo entenas la volon de Dio kaŭzas la reagon de la religia institucio kiu ne povas elteni mesaĝon je plena egaleco, malpli ol iam en la firmigita regado de la viro super la virino (Mk. 10,2... “Ĉu estas permesate al viro forsendi sian edzinon?”). Por Jesuo estas klare ke la skribita leĝo (Mk. 10,3 “Kion Moseo ordonis al vi?”) ne ĉiam spegulas la volon de Dio, sed ĝi estis kondiĉita de la epoko kaj distordita de la homoj; pro tio ne ĉio povas havi longdaŭran valoron (Mk. 10,5 “Pro la malmoleco de via koro li skribis por vi ĉi tiun ordonon”). La Dio de Jesuo, fakte, estas amo kaj li ne povas esti esprimita pere de la leĝo sed nur pere de agoj kiuj generas vivon (Mk. 10,6... “Dio faris ilin vira kaj virina”) kiel la disvolvo de la geedzoj pere de kunfandiĝo en ununura aĵo (Mk. 10,8...” sekve ili jam estas ne du, sed unu karno”). Se la amo daŭras, tiu ĉi nedisigeblo estas nedispecigebla (Mk. 10,9 “Kion do Dio kunigis, tion homo ne disigu”), sed se tio ne daŭras ankaŭ la unuiĝo mankas, ĉar estas la homoj kaj ne la institucioj kiuj estas la fundamento de la geedziĝo.

Ĵaluzaj pri siaj taskoj, la disĉiploj penas kompreni la ampreferon por la lastaj en la terglobo (Mk. 10,14 “...ĉar el tiaj estas la regno de Dio”) kaj la inviton sin meti je la servo de ĉiu homo, konsiderante nenium plej malalta (Mk. 10,15... “Kiu ne akceptos la regnon de Dio kiel infano, tiu neniel eniros en ĝin”). Kiel la honoroj, ankaŭ la serĉado de la sekureco, pere de la ekonomia firmeco (Mk. 10,22... “li havis multajn posedaĵojn”) povas generi angoron (Mk. 10,17 “kion mi faru, por ke mi heredu eternan vivon?”). Jesuo interesiĝas komprenigi tion, ke kvankam oni povas opinii ke li posedas multajn aĵojn, oni povas manki je ĉio, kaj, pro tio, li invitas eksperimenti en la nuno la eternan vivon (Mk. 10,21... “iru, kaj vendu ĉion, kion vi havas, kaj donu al malriĉuloj, kaj vi havos trezoron en la ĉielo”). Dum la leprulo estis resanigita kaj la demonposedato estis liberigita, ne estos eble liberi la riĉulon (Mk. 10,22... “li malgajiĝis ĉe tiu vorto, kaj foriris malĝoja”) kiu ne komprenis ke li ne estas mastro de siaj havaĵoj sed li estas tute subigita al ili. Oni, fakte, posedas nur kion oni donas kaj la vivo, en ĝia plej alta senco estas garantiata nur de la kundivido kaj ne de la akumulo (Mk. 10,23 “Kiel malfacile tiuj, kiuj havas riĉon, eniros en la regnon de Dio!”). Al tiu kiu estigas vivon, sekve, estos donite eĉ pli, dum kiu ne kapablas tion fari iĝos seka (Mk. 4,25 “Ĉar al tiu, kiu havas, estos donite; sed for de tiu, kiu ne havas, estos prenita eĉ tio, kion li havas”). Ankoraŭ ligitaj al la kategorio de la merito (Mk. 10, “Jen ni ĉion forlasis kaj vin sekvis”), la disĉiploj ne kapablas kompreni (Mk. 10,24 “Kaj la disĉiploj miris pro liaj vortoj”) la proponon transformi la medion en la regno de Dio, kie la akumulon oni anstataŭigas per la kundivido kaj la regadon per la servo (Mk.10,31 “Kaj multaj unuaj estos lastaj, kaj lastaj estos unuaj”). La bildo de Dio kiu sin rekonas en la servado kaj ne en la povo estas malfacile komprenebla, ĉar restas malfacile akcepti por ni mem tiun rolon kaj ties sekvojn (Mk. 10,32 “kaj li ekparolis pri tio, kio okazos al li”). La ekzemplo de vivo proponita de Jesuo ne celas alporti surterajn triumfojn, sed la disĉiploj daŭre ne komprenas kaj interesiĝas nur pri siaj ambicioj (Mk. 10,37 “Permesu, ke ni povu sidi, unu dekstre de vi kaj la dua maldekstre, en via gloro”), montrante tiamaniere la malfacilaĵon disiĝi de la komunaj logikoj Mk. 10, 38 “Vi ne scias, kion vi petas”) kiuj povas konduki al nenio krom al disdivido de la komunumo (Mk. 10,41... “la dek ekindignis”).

Kiel instruisto kiu havas rilaton al nekapablaj lernantoj, Jesuo memorigas la trian fojon ke estas eraro pripensi la regnon de Dio pere de la kategorioj de la surteraj regnoj (Mk. 10, 42... “Vi scias, ke tiuj, kiuj pretendas regi la naciojn, kondutas kiel sinjoroj super ili, kaj iliaj granduloj ekzercas aŭtoritaton super ili”): la valoroj de la regno de Dio proponitaj de lia mesaĝo estas tute malaj (Mk. 10,43... “kiu volas esti granda inter vi, tiu estu via servanto”). Kristo mem estas la unua kohera atestanto pri tiu sinteno kiun li atestas ĝis la ekstrema sekvo (Mk. 10,45 “Ĉar la Filo de homo venis, ne por esti servata, sed por servi, kaj por doni sian vivon kiel elaĉeton por multaj”). La homo kiu konsideras la ambicion kaj la honoron de la socio, tiu ne kapablas kompreni Jesuon (Mk. 10,46... “Bartimeo, blinda”) kaj fekundigi sian mesaĝon (Mk. 4,15 “Jen do tiuj, kiuj estas apud la vojo, kie estas semata la vorto; kaj kiam ili aŭdis, tuj venas Satano, kaj forprenas la vorton, en ili semitan”). Per la helpo de la komunumo Mk. 10,49 “Kuraĝu! leviĝu, li vin alvokas!”), la individuo, tamen, havas la kapablon kaj la eblon rezigni la malverajn valorojn, fariĝinte libera (Mk.

10,50... “Kaj li forĵetis sian veston, kaj eksaltis”) por rekoni finfine en Kristo tiun kiu estas la alportinto de vivo (Mk.10,52 “Kaj tuj li ricevis vidpovon, kaj sekvis lin sur la vojo...”).

Dum la atendo de Kristo fare de la komunumo estas ligita al atendo je povo kaj prestiĝo (Mk. 11, 8... “multaj sternis siajn vestojn sur la vojo...”) ĉar ĝi estas tiel ligita al la tradicio de la pasinteco (Mk. 11,10 “Estu benata la venanta regno de nia patro David!”), tiu de la religia povohavantoj estas kunligita al la timo de la sekvoj kiujn ĝi povos havi en ilia estonto. En la tempo kiun oni donis al ili, ili nur produktis ŝajnon (Mk. 11,13... “li trovis nenion krom folioj”) kaj nenium vivan frukton (Mk. 11,13... “ĉar la tempo de figoj ankoraŭ ne venis”) kaj pro tio ili estas destinitaj neniam plu produkti eĉ en la estonto (Mk. 11,14... “Neniu por ĉiam manĝu frukton el vi”). Tial Jesuo ne venis por purigi la kulton, sed por ĝin abolicii (Mk. 11,15... “li renversis la tablojn de la monŝanĝistoj kaj la seĝojn de la vendantoj de kolomboj”), do li metis finon al la malnova interligo. La Dio kreanta kaj liberiganta, kiu estis transformita de la sacerdotoj en subpremanton soifan je buĉadoj kaj oferoj (Mk. 11,17... “Sed vi faris ĝin kaverno de rabistoj”), fakte estas neakordigebla kun la Dio de mizerikordo anoncita ankaŭ de la profetoj.

Atesto kaj fido je la novaĵo de Lia mesaĝo kapablos alporti tute solaj al la sekiĝo de tiu religia sistemo (Mk. 11,20... “ili vidis la figarbron forvelkinta de la radikoj”) kiu nur konsideras la aŭtoritaton (Mk. 11,28 “Laŭ kia aŭtoritato vi faras ĉi tion?”) kaj kiu, pro timo (Mk. 11,32... “ili timis la popolon”) estas preta eĉ al mensogo (Mk. 11,33 “Ni ne scias”). La mesaĝo de Jesuo, kiu baziĝas sur la amo kaj la oferdono kontraŭstaras la instruon de la skribistoj kaj de la fariseoj (Mk. 1,24 “Kio estas inter ni kaj vi, Jesuo Nazaretano? ĉu vi venis, por pereigi nin!”) kiu baziĝis sur la devigo kaj sur la devoj de la homo al Dio kaj al institucio. La liberigo el tiu ĉi sistemo certe ne estos sena je la sufero kiu naskiĝas el disfalo de la akiritaj certecoj (Mk. 1,26... “la malpura spirito konvulsiigis lin, kaj, laŭte kriinte, eliris el li”), sed poste oni finfine povos percepti (Mk.1,27... “Nova instruado kun aŭtoritato”) la liberigantan agon de Jesuo kaj lian veran devenon el Dio.